nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2013

## NOVAĴOJ PRI LA KURSOJ

Juan del Castillo organizos bazan kurson, kaj ankaŭ respondecos pri la supera kurso kiun ĝis nun gvidis Pedro Hernández. Ili de nun okazos ne en la sidejo, sed en la Centro Gallego, strato Carretas 14, 3º, ĉiun sabaton ekde la 12:00 horo.

Eblas aliĝi al la baza kurso pere de la paĝo: http://www.plannic.es/plan/7871/esperantokurso. Oni povas skribi ankaŭ al la adreso cursosesperantoenmadrid ĉe gmail.com

Bonvolu diskonigi inter eblaj interesatoj.

## SAT-KONGRESO

Kiel ni jam plurfoje komentis, la 86a kongreso de SAT okazos ĉisomere en Madrido, komencante la 28an de julio, kaj ĝis la 4a de aŭgusto 2013, kun tritaga postkongreso vizitante ĉirkaŭajn urbojn dum la 5a, 6a kaj 7a de tiu sama monato.

Estas tamen grava novaĵo: pro modifo en la universitataj kondiĉoj, la sidejo ne estos la studenta restadejo Colegio Mayor San Juan Evangelista, kiel antaŭe anoncite, sed la Colegio Mayor Chaminade. Tiu ĉi situas tute apude, kaj tio ne influos la alvenkondiĉojn nek la programon. Estas tamen modifo kiu pli koncernas niajn ekstermadridajn legantojn: la loĝ- kaj manĝ-kondiĉoj en tiu ĉi restadejo estas iom malsamaj: ili estas iom pli komfortaj, sed ankaŭ iom pli multekostaj. Bv. kontakti kun la organizantoj por koni la precizajn detalojn.

Kiel oni anoncis dum la hispana kongreso en Zaragozo, dum tiu SAT-kongreso Miguel Fernández prezentos imponan verkon titolitan “Poezio: armilo ŝarĝita per futuro”, grandan antologion de la engaĝiĝinta literaturo de Hispanio.

Oni povos trovi pli ampleksan kaj detalan informaron pri la kongreso (aliĝiloj, listo de aliĝintoj, loĝejo, kiel alveni, fotoj ktp.) en la oficiala retejo http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

*VIVU LA TEATRO!*

Kadre de la madrida SAT-kongreso oni projektas fari omaĝon al la teatro, gvidotan de nia licea kolego la poeto Miguel Fernández. Jen ni kopias lian mesaĝon kaj alvokon:

> Ni ŝatas teatron kaj teatri. Ni pensas, ke se ne ĉiu el ni estas iu Laurence Olivier, iu Chaplin, iu Pavarotti ktp... ja multaj el ni povus digne elturniĝi sursceneje, feliĉi kaj feliĉigi aliajn per la magio de teatro. Ni pensas do pri spektaklo ludota de ĉiuj kongresanoj kun minimume digna arta nivelo interesataj en ĉi omaĝo. Kompreneble, nia diseco ne permesus al ni munti formalan teatraĵon, sed eblus kunmeti unuopajn etajn ludadojn en tutan spektaklon, nian komunan verkon. Ĉiuj kompanoj kapablaj voĉlegi aŭ reciti poemon, prezenti etan monologon, mimadi, unuope aŭ grupe ludi muzikilon aŭ kanti ktp petatas al partopreno. Bonvolu kontakti nin ĝis la fino de junio (miguelfer18-ĉe-yahoo.es). Surbaze de ĉiuj proponoj ricevitaj ni kreos rakontan fadenon kaj fonmuzikon laŭan al la naturo de la ludotaĵoj. Surloke, ni faros ĝeneralan provludon antaŭ la definitiva prezento.
>
> Geamikoj, ek do al la scenejo!

## VALENCIA RENKONTIĜO

La sufiĉe nova Klubo kreita en la valencilanda urbeto Olivo organizos inter la 21-a kaj la 23-a de junio Valencian Esperanto-Renkontiĝon. Detalojn eblas legi en http://esperantoval.com/.

Madrida Esperanto-Liceo donacis al la grupo diversan materialon, kiel apogon al la disvolvo de la grupo.

## FINIĜIS LA HISPANA KONGRESO

Inter la 3-a kaj 5-a de majo okazis en Zaragozo la 72-a Hispana Kongreso, kun pli ol 100 partoprenantoj en preskaŭ ĉiuj regionoj el Hispanio, kaj ankaŭ vizitantoj el aliaj landoj.

Pri detaloj kaj rezultoj, legu en Boletín de Hispana Esperanto-Federacio aŭ en la retejo http://www.esperanto.es.

## TAGO DE LA LIBRO EN SAN FERMÍN




La 28-an de aprilo disvolviĝis la Tago de la Libro en la madrida kvartalo San Fermín (Usera) fare de la asocio de tieaj loĝantoj Asociación de Vecinos de San Fermín. Ĝi okazis en la Gastejo San Fermín, kiun mastrumas tiu asocio kaj kie disvolviĝis la IRo 2013 dum pasinta marto.

La agado havis unuflanke socian intencon, ĉar la najbaroj celas de antaŭ jaroj la konstruadon de publika biblioteko en la kvartalo, kiun la urbestraro estis jam antaŭe promesinta, per oficialaj dokumentoj. La promeso estos verŝajne rompita, sed la kvartalo ankoraŭ konservas sian peton, kiun ili konsideras konstitucia rajto. Aliflanke, temis pri partoprena agado, en kiu infanoj kaj plenkreskuloj faris omaĝon al la libroj kaj la legado.

Tial, oni prezentis libron titolitan "Sklodowska Curie, una polaca en París" (polino en Parizo), kaj oni invitis la aŭtorojn Belén Yuste kaj Sonnia L. Rivas Caballero, kiuj verkis biografion pri tiu grava sciencisto, pli konata kiel Maria Curie. Dum la prezentado oni legis diversajn memorindajn citaĵojn de tiu granda virino, en diversaj lingvoj, kiel la pola, la angla, la franca, la rusa. Kaj ankaŭ nia samideanino Matilde Montero legis jenan citaĵon en Esperanto:

> "Ni ne povas esperi, ke ni konstruu pli bonan mondon sen plibonigi la homojn. Tial, ĉiu el ni devas labori sian propran perfektigon akceptante sian parton da respondeco en la ĝenerala vivo de la Homaro, ĉar nia propra devo estas helpi tiujn, al kiuj ni povas esti utilaj."

Post la prezentado, oni legis pecojn de diversaj konataj literaturaj verkoj, kaj Mati havis tre afablan konversadon kun la aŭtorinoj, kiuj komentis ke iu el iliaj avoj estis esperantisto, kaj ke la legado de tiu mallonga frazo en Esperanto vekis en ili memorojn pri la infaneco kaj la geavoj.

## HELPO AL ORFEJO DE KONGO

Memoru ke nia samideano Pedro Hernández peras helpkontribuojn por orfejo en urbo Goma, Kongolando, estrata de esperantistoj. Kontribuu al la konto ĉe Triodos Bank: 1491 0001 22 2042949723.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj en retejo http://www.esperanto.es/mel.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com